

Promeno en la Esperanto-gazetaro
“Kataluna Esperantisto”
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1991.11.23

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

Multaj gazetoj kaj revuoj regule atingas nin kaj dum kelkaj elsendoj ni dankos al ties redaktistoj per laŭtlego de kelkaj signifaj artikoloj.

A.- La revuo **Kataluna Esperantisto**, la oficiala organo de **Kataluna Esperanto-Asocio**, en sia numero 275-a, julio-aŭgusto de 1991, atentigas la legantaron pri la dekjariĝo de la **Raŭma Manifesto**.

Cl.- Ĝi publikigas tiun manifeston, kiu estis verkita, diskutita kaj akceptita de la **36-a Internacia Junulara Kongreso** grupiginta en la jaro 1980 tricenton da gejunuloj en la finnlanda urbo Rauma.

A.-Inspirita de artikolo aperinta en la revuo **Bulgara Esperantisto** en decembro 1990, **Hektor Alos i Font**, unu el la tri redaktistoj de Kataluna Esperantisto, provas komprenigi la signifon de tiu manifesto.

Cl.- Antaŭ ol mi citos la ĉefajn erojn el lia artikolo, vi laŭtlegu la konkludon de la Raŭma Manifesto:

A.- "Ni kredas, ke la unua jarcento de Esperanto pruvis la taŭgecon de la lingvo por esprimi **ĉion**; [...] komence de la dua jarcento, ni devos ekmontri al la mondo, ke ni kapablas ankaŭ diri **ion** - ion kulture originalan kaj internacie valoran."

Cl.- Kaj nun mi citos la ĉefajn partojn de la artikolo de Hektor Alos i Font, avertante ke tiun artikolon ni volonte sendos fotokopie al la interesatoj, kiuj petos la koncernajn fotokopiojn skribante al Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 BERN 15, Svislando.

A.- Hektor Alos i Font enkonduke diras:

Cl.- "La manifesto de Raŭmo estas multflanke unika dokumento en la historio de Esperanto. Eble plej konstatinda estas tio, ke ĝi post dek jaroj, neniom perdinte sian validecon, ankoraŭ vekas diskutojn kaj gvidas esplorojn laŭlarĝe de nia movado."

A.- Hektor Alos i Font tiel resumas la manifeston:

Cl.- "La manifesto, naskita de sube, en junulara medio dum la Internacia Junulara Kongreso de Raŭmo (Finnlando) en 1980, estas klarega analizo de la esperantistaro kaj lerte kritikis ĝiajn fantomojn, nome kelkajn ankoraŭ nun ie laŭtigatajn missloganojn. Ĝi tamen ne estas nur modela analizo kaj prava kritiko, sed - eble ĉefe - konstrua propono. Ĝi listigas la esencajn valorojn de Esperanto, kiujn indas cetere diskonigi dum informado, kaj proponas vojon por iliaj disvolvigo kaj vastigo. Fine, la dokumento lanĉas imponan defion al la esperantistoj por la dua jarcento de la lingvo.

A.- Oni povas diri, ke la Manifesto de Raŭmo reorientis la aktivecon de multaj esperantistoj, kiujn oni nomas raŭmistoj. Ni ree citu Hektor Alos i Font:

Cl.- "Raŭmismo estas opinimovado, kiu pluvojas post la manifesto, kaj produktadas artikolojn kaj dokumentojn kompletigantajn tiun ĉarton. Taŭgas en tiu nur enkonduka kontribuo, ke ankaŭ kelkaj el tiuj ideoj estu prezentitaj.

A.- Jen kion li plue skribas sub la titolo "Skizofrenio de la esperantistaro":

Cl.- La unua punkto de la manifesto montras la skizofrenian karakteron de la esperantistaro, ĉefe en sia publika informa flanko. Verduloj psalmas malnovajn himnojn - prcelojn - prezentante kiel ĉefmotivojn de nia movado ideojn, kiuj praktike ne rolas en nia komunumo:

A.- "la dua lingvo por ĉiuj, la angla estas nia malamiko, UNO devas adopti esperanton".

Cl.- "Krome propagandistoj senhonte mensogadas ekzemple pri milionoj da esperantistoj en la tuta mondo kaj dekmiloj en la propra lando, kion ili mem ne kredas. Tiuj sloganoj tamen neniam influis nian personan koncepton pri la lingvo, ĉar ni mem

A.- "ĝuas kaj aplikas Esperanton laŭ tio, kio ĝi efektive estas";

Cl.- la esperantistoj estas tiaj, sendepende de fantaziaj malnovaj devizoj. Nia transnacia lingvo valoras nun; ĝi plu estos kara, se neniam oni atingos la finan venkon - kio, cetere, estas absolute ebla. Tial tiu fina venko tute ne estas esenca por la valorigo de Esperanto. Ĉiuokaze oni devas ekiri el firma bazo. Ĉar la oficialigo de Esperanto ne estas verŝajna en la proksima estonteco, ni devas havi aliajn aspirojn. Oni tamen komplete mistrafas la celon kritikante tiun aŭ tiun ĉi mondan helplingvon, ĉar Esperanto ne estas nur tio.

A.- "Kia rolo por esperanto?" estas la titolo de dua ĉapitro, el kiu ni ree faru kelkajn citaĵojn:

Cl.- Ĝia rolo estas tiu de perilo por novtipa internacia kulturo, kiu ja estas unu el la valoroj atingitaj en nia komunumo. Certe en esperantio ni havas kontaktojn inter ordinaraj homoj, ĉar ne ĉefe privilegiuloj lernintaj dum longaj jaroj fremdajn lingvojn kaj staĝintaj monatojn eksterlande sukcesas flue interkompreniĝi. Esperanton ĉiu povas ellerni ĉe si. Planlingvo kia nia, cetere, permesas kontaktojn sendiskriminaciajn, kie neniu denaske superas la aliajn. [...] Esperanto bonege helpas la alproprigon de fremdaj lingvoj. Jen sur tiuj realaj atingoj kaj valoroj, kiujn ni povas kaj devas larĝigi, ni plu sulku nian vojon! La manifesto asertas eĉ, ke

A.- "la kresko de niaj fortoj kaj la aliĝo de novaj homoj estas nepre kondiĉitaj de la konsciiĝo pri tiuj ĉi valoroj"

Cl.- kio estas klara admono publike prezenti tiujn faktojn - kaj ne fifamajn prcelojn - dum informado."

A.- Fine de sia artikolo Hektor Alos i Font, citante Sándor Révész, la redaktoron de Bulgara Esperantisto, raportas pri du manieroj koncepti esperantion, ia maniero de la revemaj propagandemuloj aŭ la maniero de la kulturemuloj:

Cl.- "La ĉefcelo de la prcelanoj estas:

A.- "akiri ŝanĝojn ekster la movado en la institucia sfero de la socio pere de la potenco de la movado";

Cl.- ili

A.- "kvazaŭ institucie prokrastas sian realigon ĝis la elformiĝo de favoraj cirkonstancoj".

Cl.- La tradicia esperanto-movado foroferas la kulturen kaj komunuman flankon de esperantio por altrudi eksteren sian revon. [...] Raŭmisme oni klopodas efektiviĝi la sociajn modelojn, principojn, valorojn, normojn de la movado en sia vivmedio tuje kaj jene, eĉ se la sociaj cirkonstancoj malebligas la tut-socian realigon.

A.- Kaj jen la konkludo de Hektor Alos i Font:

Cl.- Nu, kiel trafe resumis Giorgio Silfer en prelego:

A.- "Ĉu ni insistos pri la bezono kreski kvante por esti pli multaj kaj tiel pli multnombre premi ĉe la institucioj por akceptigi majn principojn - aŭ ĉu ni decidus esti pli multaj simple por vivi pli multnombre laŭ niaj principoj, plaĉu tio aŭ ne al la institucioj?"

Cl.- La unua vojo portas al frustracio, minuskompleksoj aŭ disdubiĝo, kiel montrite en la Manifesto. La dua ebleco montras la vojon al nia kvalita pliboniĝo, kio devos porti al plenumo de la Raŭma defio."

A.- Tio estis kelkaj citaĵoj el artikolo aperinta en la revuo **Kataluna Esperantisto**, julio-aŭgusto 1991. Kiel ni diris, ni volonte sendos fotokopion de la tuta artikolo al tiuj, kiuj skribe diros sian interesiĝon pri la Manifesto de Raŭmo.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond diras: Ĝis reaŭdo!